N-o 3. **BULTENO** 1935. 15. V.

**DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA**

*Redakcio kaj administracio: Praha XIX., Uralské nám. 447. Telefona n-ro 718-41.*

*Redaktas: Dr. ST. KAMARYT, Dr. A. PITLÍK, O. GINZ.*

*Senpage por membroj de Ĉs. Asocio Esperantista. Aperas sesfoje dum la jaro.*

# La XVI-a ĝenerala kunveno de Ĉeĥosl. Asocio Esperantista

okazis la 14-an de aprilo 1935 en Praha en kafejo Louvre.

Ĉeestis 47 membroj, skribe reprezentitaj 98, sume 145 membroj. Krome 6 gastoj. La ĉeestantoj estis el Bakov n. J., Bratislava, Děčín, Dolní Bousov, Hradec Králové, Košice, Kutná Hora, Lázně Bělohrad, Mladá Boleslav, Praha, Prostějov, Rumburk, Slaný, Těpeře. Sume el 14 lokoj.

La kunveno daŭris de 9'30 ĝis 13'50 h.

Malfermante la kunvenon la prezidanto rememorigis la 85-an naskiĝdaton de la respublika prezidento kaj prezentis la komitatan proponon esprimi al li telegrafe niajn plej estimajn sentojn. La propono estis akceptita ĉiesvoĉe kaj kun aplaŭdo.

Rememorigante pri datreveno de morto de Zamenhof (14. IV. 1917) la prezidanto legis liston de ĉeĥoslovakaj samideanoj mortintaj depost la lasta jarkunveno: Inĝ. F. Liška (Louny), L. Procházka (Pelhřimov), s-ino Wildmanová, s-ino M. Weiskopfová, Dr. Bělohlav, Otto Pressburg (ĉiuj el Praha), Bakalář-Srbecký (Podivín). La ĉeestantoj honorigis ilian memoron ekstarinte.

Salutaj leteroj venis de Amika rondo esperantista en Novi Sad kaj de Hungara Esperanto-Societo en Budapest, lokaj grupoj: Brno, Progreso en České Budějovice, Joachimstal, Bratislava, Klub Malostranských esperantistů, Verda stelo en Mnichovo Hradiště, Klubo de ĉeĥaj e. en Mor. Ostrava kaj de samideanoj Dro Fousek, J. Šupichová, Vondroušek, Borovka.

1. **Protokolo pri la lasta ĝen. kunveno** ne estis laŭtlegita, ĉar ĉiuj konsentis aprobi ĝin tiel, kiel ĝi estis publikigita en la Bulteno.

2. **Raporto pri la agado kaj pri la kaso.** Ĉar raporto pri la agado aperis en la 2-a n-ro de la Bulteno, la kunveno konsentis ne legi ĝin, sed tuj diskuti pri koncernaj alineoj.

a) Administrado. La prezidanto prezentis al la kunveno la oficiston de nia oficejo s-on Ŝavel kaj esprimis ĝojon, ke la ambaŭ partioj — la komitato de ĈAE kaj s-ro Ŝavel — estas kontentaj. Li esperas, ke la disvolviĝo de nia afero ebligos pli bonan ekonomian aranĝon por la nova kunlaboranto.

b) Oficeja fondaĵo. La prezidanto atentigas pri la malgranda sumo ĝis nun kolektita kaj petas, ke la ĉeestantoj rekomendu en siaj kluboj donacojn kaj donacetojn por la fondaĵo. Dr. Marek proponis, ke oni entreprenu tuj monkolekton inter la ĉeestantoj. Post ĝenerala konsento s-ino Echtnerová efektivigis la kolektadon, kies sumo estis 221'50 Kč. La prezidanto dankis la kunvenon pri tiu tre bona rezulto. Poste oni rekomendis al ĉiuj kluboj kaj opaj esperantistoj, kiuj ne ankoraŭ dotis la Oficejan fondaĵon, ke ili plenumu la peton de speciala cirkulero pri la oficeja fondaĵo, kiu estu baldaŭ dissendata.

c) Ekspozicia materialo. Šustr deklaras, ke li pro personaj kialoj ne povas plu ĝin administri. Post diskuto (Ginz, Šustr, Pytloun) deklaris staciestro Beran (L. Bělohrad), ke li konsentas akcepti en nomo de la E. Klubo en L. Bělohrad administradon kaj konservon de la materialo. La propono estis danke akceptita.

d) Varbado de la membroj. Ĝeneralan kontentigon kaŭzis sciiĝo, ke krom la kluboj nomitaj en la raporto pagis post fermo de la kalkulo ankoraŭ klubo en Prostějov, ke do restas el korporacie aliĝintaj kluboj jam sole du, kiuj ankoraŭ ne pagis. Kun aplaŭdo estis ankaŭ akceptita la informo, ke por j. 1935 aliĝis korporacie Klubo de ĉeĥaj esp-istoj en Moravská Ostrava kaj la klubo en Mnichovo Hradiště. Friedrich esprimis firman konvinkon, ke la kresko de nia membraro, kiu daŭras dum pluraj jaroj, ne malgrandiĝos eĉ laŭ procento. La gvidantoj de kursoj nepre devas aliĝi al studenta sekcio ĉiujn studentojn; la kotizo (6 Kč) ne povas ja pro sia malalteco esti malhelpo. — Ni nepre devas organizi stariĝon de lokaj grupoj, disponigante al ili modelan statuton, kiun ĵus finis Friedrich (Ginz).

— Ĉiujn adresojn de interesantoj el skoltaj rondoj tuj sendu al Junulara komisiono, por ke ili estu daŭre prilaborataj (Friedrich).

f) B u l t e n o. Friedrich dankas la redaktorojn pro ilia sindona laboro. Dr. Pitlík atentigas pri grandaj meritoj, kiujn havas pri la Bulteno ĝen. sekretario Ginz.

g) L e r n e j a j a f e r o j. Kamaryt informas pri la nuna nefavora situacio ĉe la lernejaj aŭtoritatoj kaj pri la projektata memorandumo. Dr. Marek petas, ke oni represu en Bulteno informon pri la koncerna dekreto pri instruado de esp-o en mezaj lernejoj. Dr. Pitlík rekomendas alvokon, ke multaj uzu la nunan eblecon esti ŝtate ekzamenitaj instruistoj de esp-o. Horáček konsilas, ke oni instigu en lernejoj kreon de studaj rondetoj por lerni esp-on.

h) P r o p a g a n d o ĝ e n e r a l a. Heikenwälder rekomendas krei distriktojn por prilaboro laŭ propagandaj vidmaniero kaj celo. La membroj devas havi personan rilaton al la Asocio. Dr. Pitlík insistas pri efektiva kaj ofta uzo de esp-o por telegramoj; se oni ne uzos la permeson, facile povas naskiĝi tendencoj nuligi ĝin. Ginz atentigas, ke ĉe „klara" lingvo oni ne rajtas kunigi la vortojn por trompige ŝpari ĉe tarifo. Dro Marek konsilas uzi esp-on ankaŭ kontaktante kun fremdlandanoj-neesperantistoj. — Ginz atentigas, ke ni posedas taŭgan tekston de prelego, kiun ni prunte disponigas al la propagandantoj.

i) P r o p a g a n d o p e r g a z e t o j. Votrubec proponas esprimi dankon al estro de komisiono Ginz kaj al lia fidela helpanto Mil. Staněk, kiu konservas kaj ordigas la gazetajn eltranĉaĵojn. Akceptita per aplaŭdo. La granda kolekto de eltranĉaĵoj el j. 1934 tre plaĉe aranĝita estis prezentita al la ĉeestantaro kaj trovis admiron de ĉiuj.

j) P r o p a g a n d o e n f a k a j r o n d o j. Estro de poŝtista sekcio Votrubec raportas aldone pri sia agado inter poŝtistoj. Li kontaktis plurfoje kun altaj oficistoj de poŝta administro kaj publikigis artikolojn en poŝtistaj gazetoj.

k) R a d i o. Baroch proponas gratuli Radio-journal en Brno pro la sukceso de la „Vendita fianĉino". Kamaryt sciigas, ke la komitato petos s-on Šamla akcepti funkcion de estro de la Radio-komisiono. Li dankas la ĝisnunan estron de la komisiono Ginz pro la multjara gvidado de radio-aferoj, precipe pro liaj siatempaj iniciatoj en tiu ĉi sfero.

l) S t a c i d o m a j t a b u l o j. Ginz vidas en nombro de stacidomoj, kie jam pendas la tabuloj, sukceson de la ideo. Tamen devus pli rapide kreski tiu nombro. Bedaŭrinda estas la fakto, ke el germanaj lokoj mendis la tabulojn sole kelkaj unuopuloj. Ni turnas nin al GEL, ke ankaŭ ĝi propagandu la tabulojn inter sia membraro.

m) L i t e r a t u r a j a f e r o j. Kamaryt petas, ke ankaŭ Dro Pumpr akceptu apartan dankon pro kunlaboro je la Ĉeĥoslovaka antologio, ĉar li tre intense helpis en tre diversa maniero. Nun ankaŭ korektado de presprovaĵoj estas finata kaj estas jam pretaj pli ol cent paĝoj de la libro. Dro Pumpr akceptis proponon de la komitato fariĝi estro de la Literatura komisiono. La kunveno kontente akceptis tiun novaranĝon. Prez. dankas al la ĝisnuna komisionestro Hromada.

n) L i b r o - s e r v o. Ginz atentigas pri graveco de tiu ĉi nova aranĝo, kies celo estas ebligi al la membroj facilan kaj malkaran mendon de esperanto-libroj. Niaj membroj uzu tiun servon ofte!

o) S c i e n c a j a f e r o j. Fr. Staněk informas, ke la Esperanto-fako ĉe la Biblioteko de la Nacia muzeo en Praha (kreita per donaco de libroj de s-o Ed. Kühnl) estas nun ordigata kaj registrata. Li traktis kun direktoro de la biblioteko Dr. Wolf, kiu volas, ke la fako estu konservata kaj kompletigata. Staněk do proponas rekomendi publike al niaj membroj donaci al la muzea biblioteko malnovajn librojn. Dr. Pitlík rekomendas tiun proponon kaj deziras zorgi, ke la libraro estu alirebla al interesantoj. Estis decidite akcepti proponon de Staněk kaj komisii lin, ke li atentu tiun ĉi gravan aferon.

p) K a s o. La prezidanto disponigis la detalan raporton de kasisto Sklenčka, senditan en kvar ekzempleroj, al la kunveno, laŭtlegis la bilancon kaj ceterajn partojn de la raporto kaj konstatis tre zorge plenumitan laboron de nia kasisto. La bilanco estas publikigata en tiu ĉi numero. La komitato proponas ne doti la fondaĵojn.

3. **Raporto de la revizoroj.** Ano de kontrola komisiono Pytloun laŭtlegis raporton de ĝia prezidanto. V. Černý: „Laŭ decido de la ĝenerala kunveno en 1934 mi kontrolis financan agadon dum la pasinta jaro. Unuopajn dokumentojn mi esploris laŭ la materio kaj mi konvinkiĝis, ke ili interrespondas kun enskriboj en la kontlibroj kaj en aliaj dokumentoj. Ankaŭ la bilancoj

ferma kaj perdo-gajno interrespondas en detaloj kaj kiel tuto al la kontlibroj. Sekve de tio mi rekomendas al la ĝenerala kunveno aprobon de la finkalkuloj pri la jaro 1934". Poste estis raportoj pri aĝado kaj pri la kaso aprobitaj ĉiesvoĉe.

4. **Elektoj.** La prezidanto sciigas, ke la ĝisnuna kasisto Sklenčka ne volas plu esti kasisto nek akcepti elekton en la komitaton. Lia provo persvadi lin, ke li restu en la funkcio almenaŭ ankoraŭ unu jaron, restis senrezulta. Sklenčka jam ne venis persone en la kunvenon kaj sendis senkulpiĝan leteron, kiun la prezidanto laŭtlegis:

Hradec Králové, 12. aprilo 1935.

Al Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista en Praha.

Estimataj samideanoj,

Mi petas vian pardonon, ke mi ne partoprenas la komitatan kunvenon, okazontan morgaŭ kaj la jarkunvenon, okazontan postmorgaŭ. Al viaj laboroj mi sincere deziras plenan sukceson.

Detalan bilancan raporton alportos nia kluba sekretario s-ro Hutař, kiu partoprenos la jarkunvenon kiel delegito de la Esperantista Klubo en Hradec Králové. Li alportos ankaŭ la raporton de la revizoro s-ro Černý.

Mi petas, ke mi estu forigita el la listo de la kandidatoj por kiu ajn funkcio. Neniun elekton mi akceptus, eĉ ne tiun de simpla komitatano sen speciala funkcio labora.

Bonvolu informi min, al kiu mi sendu la kontlibrojn kaj la kasdokumentojn kun la lasta resto de diversaj provizoj por s-ro Slavík. Ricevinte vian informon, mi tuj ekspedos la lastan keston

Kvankam mi tiel por ĉiam malaperas el la aktiva movado, mi petas la iamajn kunlaborantojn, ke ili daŭre havu por mi amikajn sentojn, kiel mi neniam forgesos la tempon, kiam mi donadis al la movado ĉion, kion mi povis.

Sincere vin ĉiujn salutas

via sindona *Sklenčka.*

La prezidanto esprimas la konvinkon, ke certe ĉiuj bedaŭras perdon de laboranto tiom sperta kaj sukcesa. Kunlaboro kun Sklenčka estis por mi fonto de plezuro. Precipe dum la lastaj dek jaroj, depost kiam Sklenčka estis akceptinta funkcion de ĉefdelegito, li dediĉis sin komplete al administrado kaj akiris en ĝi rezultojn maloftajn. Li evitis severe ĉian specon de esperantista politiko, li evitadis zorge malŝpari siajn tempon kaj laborkapablon por elpensado aŭ prilaborado de teorioj pri disvolvo de la movado aŭ de la lingvo. Tamen li kreskis kiel etika individuo laŭ la sama skalo kiel teknikisto administra. Li estas dokumento por la aserto, ke kresko de moralaj kapabloj dependas de la kresko de spertecoj teknikaj. Tian kunlaboranton ni perdas. La komitato proponis, ke la kunveno honorigu samideanon Sklenčka per telegrafa saluto kaj ke ĝi esprimu deziron, ke li baldaŭ revenu inter niajn aktivulojn. Aprobite ĉiesvoĉe.

Krom Sklenčka eliras el la komitato (pro trijara funkciado) Echtner, Friedrich, Kožený. La komitato proponas elekti la tri nomitajn kaj Teodoron Kilián el Třebíč. — Por la vickomitatanoj estas proponata la ĝisnuna listo kun plua loko por Inĝ. Lad. Krajc, profesoro en Moravská Ostrava. — Por membroj kaj vicmembroj de kontrola komisiono estas proponata la pasintjara listo kun Konstantin Koutek anstataŭ Bujarek eliranta. — La propono estis akceptita ĉiesvoĉe. La rezultinta listo estas publikigata en tiu ĉi numero.

La prezidanto esprimas sinceran dankon al la ne plu elektata samideano V. Bujarek (Nové Zámky) pro lia daŭra kunlaboro en komitato kaj kontrola komisiono kaj esperas, ke la kunlaboro ne ĉesos.

5. **Fondo de tutŝtata centro.** Prezidanto de la Porstatuta komisiono Friedrich raportas pri la nuna stato de klopodoj. Pri la kunveno de la komisiono en Kolín raportis Bulteno sur p. 37. La proponoj pri ŝanĝoj venintaj de prof. inĝ. Scholze kaj dro Pontz surprizis nin; parte pro tio, ke ili venas post tiom longa tempo kun propono pri alia nomo (Ligo anstataŭ Asocio), kvankam ni petis ilin antaŭ unu jaro jam, ke ili diru sian opinion pri taŭga nomo de la nova asocio; parte ĉar ili nur nun proponas, ke la naciaj sekcioj rilatu kun la internacia centro senpere. Ni ja entreprenas la propagandon por unu tutŝtata centro ĝuste pro tio, ke UEA bezonas en ĉiu ŝtato po unusola centro propaganda kaj administra. Post proponoj de Scholze-Pontz venis ankoraŭ proponoj de prof. Murath, facile enigeblaj en la projektatan statuton. Ĉar niaj germanaj amikoj ĉiam deklaradis, ke ilia sinteno dependas de decido de ilia membraro, kiu manifestiĝas en la kunvenoj, ni ĝojis, ke ni povos uzi la ĝeneralan kunvenon de GEL, okazontan tradicie en januaro, por klarigi nian vidmanieron al GEL-anoj. Tial ni ankaŭ prokrastigis nian kunvenon ĝis aprilo. Mirigis nin malfrua dato de GEL-kunveno (21. IV.), sed ankoraŭ pli mirigis nin la letero de GEL, kiun ni laŭtlegas:

Reichenberg, la 9an de aprilo 1935.

Al la Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista en Praha.

Tre estimataj samideanoj,

Ni eksciis el via Bulteno, ke okazos la 14an de aprilo 1935 via XVIa ĝenerala kunveno en Praha.

El la programo tuŝas nin la 4a punkto: Fondo de tutŝtata centro. Por klarigi nian vidpunkton al tiu problemo, ni permesas al ni esprimi al tiu ĉi punkto, kiu estas en simila formo ankaŭ en programo de nia jarkunveno, la opiniojn de la GEL-membraro.

Laŭ la informoj kaj sciigoj, kiujn ni ricevis post la publikigo de la statutprojekto, ni povas konstati jenan fakton: proksimume tri kvaronoj de nia pasintjara membraro esprimis la deziron, ke GEL restu memstara organizo, havanta kiel Landa Asocio de UEA sian centron en Genève; la resto de nia membraro parte ankoraŭ ne informis nin, parte postulas, ke GEL ĉesu esti tute memstara landa asocio, sed fariĝu aŭtonoma sekcio de tutŝtata organizaĵo.

Ni informas vin pri tiu ĉi fakto, por ke vi faru viajn decidojn, plene konante la situacion.

Pri tiu ĉi stato ni raportos ankaŭ al nia ĝenerala kunveno en Jägerndorf.

Sed ĉiuokaze ni esperas, ke la ĝisnunaj bonaj interrilatoj inter ĈAE kaj GEL daŭru ankaŭ estonte kaj konduku al pli intensa kaj pli vigla kunlaborado reciproka.

Post klarigo de la reciprokaj vidpunktoj la jaro 1935 estu komenco de nova epoko de paca konkurado en esperantismo. En tiu ĉi senco ni deziras al la ĝenerala kunveno sukceson kaj restas kun amikaj kaj sinceraj salutoj samideanaj

Germana Esperanto Ligo (G.E.L.)
en Ĉeĥoslovakio

*Ing. Scholze.* *Dr. Josef Pontz.*

La rifuzo de estraro de GEL ne kunlabori en fondado de tutŝtata centro estas klara. Kaŭzo ne estas en ĉeĥoslovakaj anoj de la komisiono. Pri la kaŭzo ĉe germanaj amikoj ni povas konjekti el artikolo de Bruno Gahler en 2a n-ro de Informilo de GEL, kiu diras, ke la germanaj espistoj ne povas kunlabori en tutŝtata asocio pro atento pri la ne-esperantista publiko germana. Nia opinio estas kontraŭa. Ni esperantistoj devas esti ekzemplo ankaŭ laŭ tiu ĉi vidmaniero al la ne-esperantistoj. Kvankam ni tre bedaŭras la rifuzon de germanaj amikoj, ni trovas fondon de la projektata asocio tiom grava, ke ni daŭrigos en tiu laboro. Tre kuraĝigas nin voĉoj de multaj germanoj el tre diversaj regionoj, kiuj postulas de ni akcelon de la fondo. Tial ni proponas finredakti la statuton uzonte ĉiujn venintajn kaj uzeblajn ŝanĝo-proponojn kaj fondi la novan asocion kun naciaj sekcioj.

Dr. Kamaryt aldonas al informoj de Friedrich, ke nek ĈAE nek GEL estas akceptitaj kiel asocioj aliĝintaj sian membraron, ĉar UEA-komitato kaj estraro volis prokrasti la decidon ĝis solvo de unueciga problemo en nia lando. Ĉeĥoslovakio estis la sola lando, el kiu estis du naciaj societoj. Ĉar tiu ekzemplo kaŭzis oftajn postulojn el aliaj landoj, ofte turnis sin gvidantaj personoj de la movado al ni kaj al GEL, ke ni fondu unusolan organizon. Jam pro tio ni ne rajtas cedi.

Dro Pitlík aldonas siajn spertojn el kontakto kun ĉeĥoslovakaj publikaj aŭtoritatoj kaj diversaj aŭtoritatuloj fremdlandaj, kiuj ĉiuj parolas por unusola centro. Grave estas, ke germanaj samideanoj deklaras sin pretaj al kunlaboro kun ni, do temas pri rifuzo el konvinko kaj volo de estraranoj. Mi spertis, ke la altaj ĉs. oficialaj lokoj riproĉas nin pro ekzisto de la du naciaj centroj.

Kamaryt proponas, ke oni pripensu, ĉu ne taŭgus, ke la fondo de la nova asocio okazu dum tutŝtata kongreso. Ĉu ne taŭgus 28.—29. septembro kaj Brno?

La kunveno akceptas proponon de Friedrich kaj komisias la komitaton trakti pri kunvenigo de tutŝtata kongreso en taŭga loko kaj dato.

6. **Liberaj proponoj.**

a) E. Klubo en Kolín proponas, ke la kotizo por membroj de korporacie aliĝintaj kluboj estu malaltigita je 10 Kč (anstataŭ 12 Kč). La prezidanto sciigas, ke la komitato traktis pri tiu propono, sed rekomendas ne akcepti ĝin. La sumo da 12 Kč ne estas alta: ni devas el ĝi preni 3 Kč por UEA kaj liveri la Bultenon. Propono de komitato estis akceptita ĉiesvoĉe.

b) La prezidanto rekomendas, ke niaj anoj diskonigu ekziston de libertempejo en L. Bělohrad kaj ke ili amase uzu ĝin. Li gratulas al la ĉeestanta prezidanto de E. K. en L. Bělohrad pro la persisto, kun kiu la tieaj samideanoj gvidas la tre utilan entreprenon kaj pro la rezultoj akiritaj dum situacio ekstreme malfacila.

c) Dr. Pitlík atentigas pri graveco de la Roma kongreso kaj pri ĝia nova organiza metodo.

d) Pytloun invitas partopreni en esperantista ekskurso 1-an de majo organizita de la klubo en Bakov n. J.

e) La prezidanto salutis unuan fojon ĉeastantan samideanon d-ron Fr. Vaněk el Dolní Bousov, kie la movado dank' al li enradikiĝis tre promese.

La prezidanto finis la kunvenon per danko pro atenta partopreno en raportado kaj diskutado. (Aplaŭdo.)

Prezidis *Kamaryt.* Protokolis *Fr. Staněk.*

---

## Gvidantaro
### de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista por 1935.

*Komitato:*

Prez. *Dr. Stan. Kamaryt,* profesoro, Bratislava, Zochova 3.

Vicprezid. *Dr. A. Pitlík,* ĉefsekretario de la komerca ministerio, Praha II., Křemencová 17.

Ĝen. sekr. *Otto Ginz,* Praha II., Bolzanova 1.

I. sekret. *Ing. C. Frant. Staněk,* Praha XI., Biskupcova 11.

II. sekret. *Josef Kožený,* profesoro, Ml. Boleslav, Nádražní 158.

Kas. *Josef Friedrich,* fervoja konsilisto, Košice, Jarná 3.

*Vuk Echtner,* oficisto, Nusle II.—741.

*Frant. Heikenwälder,* librotenisto, Prostějov, Vrchlického 18.

*Rudolf Hromada,* oficisto, Praha VII., Sochařská 2.

*Teodor Kilián,* prof., Třebíč.

*Jar. Šustr,* komercisto, Praha I., Dlouhá tř. 53.

*Josef Vondroušek,* bankoficisto, Brno-N. Černovice, Školní 69.

*Vickomitatanoj:*

*Emil Beran,* staciestro, Lázně Bělohrad.

*Dr. Josef Fousek,* advokato, Přelouč.

*Jan Janda,* oficisto, Kolín, Komenského 194.

*Inĝ. Lad. Krajc,* prof., Mor. Ostrava, Erbenova 29.

*Ladisl. Krisl,* instruisto, Lom u Mostu, Nádražní 551.

*Miloslav Staněk,* Praha II., Příkopy 24 (fa Neff).

*Anna Tarantíková,* oficistino, Praha XI., Karlova 8.

*Ján Valašťan-Dolinský,* instruisto, Turč. Sv. Martin, Mudroňova 31.

*Membroj de kontrola komisiono:*

*Vil. Černý,* bankoficisto, Hradec Králové.

*Dr. A. Konečný,* advokato, Jaroměř.

*Konstantin Koutek,* konsilisto, Praha II., Smečky 28.

*Inĝ. Rud. Novák,* Plzeň, Mánesova 59.

*Frant. Pytloun,* fervojisto, Bakov n. Jiz.

*Vicmembroj de kontrola komisiono:*

*Frant. Hanzelka,* Lazy.

*A. Holancová,* Vyškov.

*V. Střihavka,* Kladno.

*Estroj de komisionoj:*

Oficejo: *Frant. Slavík,* librotenisto, Praha XIX., Uralské 447.

Gazetara servo: *Otto Ginz.*

Radio: *J. V. Šamla,* redaktoro, Brno, Radiojournal.

Literaturo: *Dr. Tomáš Pumpr,* Praha IV., U Píseckě brány 241.

Turismo: *Dr. Aug. Pitlík.*

Ekspozicia materialo: *Emil Beran.*

Lernejo: *Dr. Stan. Kamaryt.*

Junularo: *Vuk Echtner.*

Sciencaj aferoj: *Dr. Stan. Kamaryt.*

Eldonado de Bulteno: *Dr. Kamaryt, Dr. Pitlík, O. Ginz.*

Poŝtistaj aferoj: *Ferd. Votrubec,* Praha VII., Schnellova 21.

---

## Komitataj kunvenoj de ĈAE.

La kvina okazis la 31-an de januaro 1935 en Praha. Ĉeestis d-ro Pitlík, Ginz, Echtner, Slavík, Hromada, Staněk Fr., Staněk Mir., Šustr. Informis pri neĉeesto d-ro Fousek, prof. Kožený, Vondroušek. — *UEA kaj unuecigo en ĈSR.* La kunveno esprimis miron kaj bedaŭron, ke estraro de GEL en sia deklaro publikigita sur p. 4. de sia Informilo 1935 eĉ ne per unu vorto rekonis kelkjaran bonan laboron de de rezigninta ĈD s-o Sklenčka. Pri nova aranĝo estis deciditaj principoj por plua agado kaj traktado. Estis laŭtlegitaj leteroj de d-ro Kamaryt al UEA pri administrado, transpreno de Teritoria oficejo, enkasigado de UEA-kotizoj (ne kunigitaj kun ĈAE-kotizoj), pri lia propono al UEA repreni la malnovan proponon de Hromada pri eldono de internacia adresaro de firmaoj komercaj kaj industriaj kapablaj korespondi en esp-o. — *ĈAE-oficejo kaj oficisto.* Estis ricevita por akceptebla pago ĉambro de s-o konsilisto Koutek. Estis dungita kiel oficisto s-o Šavel. Oficejestro estos s-o Ginz. Estis laŭtlegita koncerna letero de prezidanto kaj post detala priparolo (Pitlík, Ginz, Hromada, Šustr) estis decidite, ke la nuna ejo oficeja estas provizora kaj servos sole kiel ejo por administraj laboroj kaj konservo de arĥivo kaj libroj. — Kotizo de *„Rada obrodných organisací“* (Konsilantaro de edifigantaj organizoj) por 1935 estos pagita (50 Kč). — *Komerca adresaro de la ĉefurbo Praha.* La kunveno decidis ne aliĝi al ĝi. — *Enciklopedio de E.* La redakcio petis fotojn pri kongresejo de UK en Praha. La peto estis plenumita. — La kunvenon prezidis d-ro Pitlík.

La sesa okazis 13-an de aprilo 1935 en Praha. Ĉeestis d-ro Kamaryt, d-ro Pitlík, Ginz, Šustr, Fr. Staněk, Friedrich, Heikenwälder, Tarantíková, Slavík. Prezidis Kamaryt, kiu esprimis sian dankon al dro Pitlík pro lia lerta kaj konscienca gvidado de la komitataj kunvenoj. — Oni detale pridiskutis la raportojn farotajn de la funkciuloj en la morgaŭa *ĝenerala kunveno.* Ĉefaj temoj de la diskuto estis: *Elektoj* por vakiĝintaj lokoj komitataj kaj de kelkaj novaj *estroj por komisionoj.* Estis laŭtlegita letero

# Financa raporto pri 1934.

XV. administra jaro de ĈAE.

| | Aktivoj Kč | h | Pasivoj Kč | h |
|---|---|---|---|---|
| **Ferma bilanco:** | | | | |
| 1. Mono en la kaso | 769 | 90 | | |
| 2. Mono en la Poŝta ŝparkaso en Praha | 2.593 | 15 | | |
| 3. Mono en Záložna peněžního úřednictva | 3.144 | 30 | | |
| 4. Inventario (post depreno de la amortizo) | 1.600 | — | | |
| 5. Diversaj entreprenoj | 1.144 | 05 | 1.750 | 70 |
| 6. Disvenditaĵoj | 1.400 | 20 | 274 | — |
| 7. Diversaj debitoroj kaj kreditoroj | 2.561 | 35 | 3.086 | 60 |
| 8. Transitivoj | 171 | 30 | 157 | — |
| 9. Asocia kapitalo | | | 8.115 | 95 |
| | 13.384 | 25 | 13.384 | 25 |
| **Bilanca Perdo-Gajno:** | | | | |
| 1. Membraj kotizoj | | | 7.896 | 50 |
| 2. Elspezoj de la administrado | 4.399 | 95 | | |
| 3. Elspezoj de la propagando | 4.583 | 60 | | |
| 4. Disvenditaĵoj | | | 201 | 90 |
| 5. Diversaj elspezoj kaj enspezoj | 413 | — | 573 | 30 |
| | 9.396 | 55 | 8.671 | 70 |
| Bilanca perdo | | | 724 | 85 |
| | 9.396 | 55 | 9.396 | 55 |
| **Asocia Kapitalo:** | | | | |
| Stato la 1-an de januaro 1934 | | | 8.840 | 80 |
| Bilanca perdo | | | 724 | 85 |
| Stato la 31-an de decembro 1934 | | | 8.115 | 95 |

Fondaĵo ekzamena . . Kč 615·60
Fondaĵo oficeja . . . . Kč 1012·20

*Otto Sklenčka*, kasisto.

de la rezigninta kasisto Sklenčka kaj la prezidanto estis unuanime komisiita deklari en la ĝenerala kunveno dankojn de nia Asocio al s-o Sklenčka por la laboroj, kiujn li faris por la movado dum longa vico da jaroj. Ĝoje estis konstatite, ke kiel komisionestroj ekfunkcios kelkaj novaj homoj. — *Enuecigo.* Prezidanto de la Porstatuta komisiono Friedrich laŭtlegis leteron de GEL kaj raportis detale pri la agado de la komisiono. Estis ĉiesvoĉe aprobita lia raporto kaj deklaroj por la ĝenerala kunveno. — *UEA.* Kamaryt raportis detale pri metodoj kaj vidmanieroj pri aligo de anoj de naciaj asocioj kaj pri la nuna situacio koncerne ĈAE kaj GEL.

**Kiu ne deziras pagi la kotizon,** bonvolu nin pri tio informi. Kvankam kun bedaŭro, ni devos streki lin el la membrolisto kaj li ne plu ricevos la Bultenon. Ni estos dankaj, se li antaŭ tia decido pripensos denove la signifon de forta organizo.

## Esperanto en Nacia muzeo en Praha.

Siatempe nia konata pioniro E. Kühnl dediĉis sian ampleksan bibliotekon al la biblioteko de Nacia muzeo en Praha. Post traktado kun direktoro de tiu ĉi biblioteko ni sukcesis fondi tie Esperanto-fakon. Tiu ĉi fako servos al vasta publiko kiel pruvo pri kultura valoro de esperanto. La direktoro dro Wolf estas al nia movado tiom favora, ke li intencas venontjare aranĝi ekspozicion de esperanta literaturo kaj dokumentaro en ejoj de landa muzeo en Praha kaj fondi en konstruota domo de la biblioteko de Nacia muzeo specialan esperanto-sekcion. Tiu ĉi sukceso ĉe scienca instituto estas grava por tuta esperantistaro.

Por kompletigado de tiu ĉi esperanto-fako estas alvokataj ĉiuj esperantistoj, kluboj kaj eldonejoj. Ofte troviĝas ĉe samideanoj valora materialo tute neuzata. En tiu ĉi biblioteko ĝi propagandos jam per sia ekzisto. Sendadu la materialon (librojn, gazetojn, dokumentojn, afiŝojn, programlistojn, flugfoliojn, gvidlibrojn, fotojn de entreprenoj) al la adreso: *Knihovna Národního Musea (esperantské oddělení) v Praze II., Václavské nám.*

Mi atentigas, ke la favoro kreskos kun via kunhelpo kaj kun amplekso de kolektita materialo. Estas nia tasko konservi la gajnitan sukceson! Ni firmigu la venkon de esperanto ne nur ĉe publiko, sed ankaŭ ĉe oficialaj institucioj, kiuj je la publiko havas specialan influon. Dankon por via kunlaboro!

Fr. Staněk.

---

*KARAJ SAMIDEANOJ,*

feliĉe mi povas nun verki kronikon en „*Týden rozhlasu*". Sed neniel mi decidas pri tio, *kiam* la kroniko aperos, kaj tial mi tre petas vin:

1. *se vi deziras*, ke mi ion publikigu, sendu la tekston frutempe (eble 2—3 semajnojn antaŭ ta okazintaĵo) kaj

2. *pardonu afable*, se eĉ poste via sciigo ne estos publikigita — mi ne estos kulpa.

Okazis jam ofte, ke oni sendis al mi sciigon pri iu festo (parolado ktp.) — *kelke da tagoj* antaŭ ĝia efektiviĝo — dum mia manuskripto estis jam presita. Kaj la dua aperos jam post la festo (parolado ktp.).

*Bonvolu kompreni tion* kaj pardoni, ke mi ne povas klarigi tiun fakton al ĉiu aparte!

24. IV. 1935, Julie Šupichová.

---

# Movado.

**Laboristoj.** Kiel ni jam raportis, traktis la 3. III. la ĝen. kunv. de la Laborista Ligo esperantista en Ĉeĥoslovakio ankaŭ pri la unuecigo de la laborista esperantista movado en nia lando. Ĝi konstatis, ke ĉiuj grupoj kaj membroj krom sole unu grupo aprobis la unuecigan planon. Tial la ĝen. kunveno aprobis tiun ĉi decidon: L. L. E. en Plzeň unuiĝas kun la Ĉeĥoslovaka Laborista Asocio Esperantista en Ústí n. L. en unu asocio sub la nomo Laborista Ligo esperantista kun sidejo en Plzeň. La Ligo havas sekciojn en Plzeň kaj Ústí n. L. kaj organon Bulteno. La estraro estas elektita el funkciuloj de ambaŭ asocioj: prez. Pech, Houškova 4, Plzeň, vicprez. L. Roscher, Ústí n. L., sekr. por Plzeň W. Svata, Koterovská 17, Plzeň, sekr. por Ústí n. L. Franz Tischer, Altlerchenfelderstrasse, Ústí n. L.

---

## Internacia Scienca Asocio.

Esperantisto havanta intereson pri iu ajn fako de sciencoj aliĝas al Internacia Scienca Asocio. Membroj ricevas valoran bultenon. Jaran kotizon Kč 20·— akceptas ĈAE sur sian poŝtŝparkasan konton.

# Radio.

Kun ĝojo ni donas ĉi tie korekton de niaj indikoj pri la esperantaj disaŭdigoj el la stacio Mor. Ostrava. S-o Gadula liveris al ni afable suban liston kaj ni bedaŭras nur, ke ni ne havis tiujn informojn antaŭ la farita eraro. Ni havas promeson, ke ni ricevos regule tiujn indikojn por registri ilin sur tiu ĉi loko.

Plej agrable estus por ni kompreneble, se ni povus la disaŭdigojn anonci al niaj legantoj ĝustatempe, t. e. antaŭe, sed tio bedaŭrinde provizore ne estas efektivigebla pro la malofta aperado de nia Bulteno.

1934:

13. II. Otakar Gadula: Ĉeĥoslovaka botindustrio.
12. III. Oskar Federer: Situacioj kaj ŝancoj de la ĉeĥoslovaka ferindustrio rilate al regiono de Ostrava. (Trad. O. Gadula.)
14. V. Otakar Gadula: Ĉeĥoslovaka minekspluato.
18. VII. Otakar Gadula: Ĉeĥoslovaka bierindustrio.
14. VIII. Otakar Gadula; Ĉeĥoslovaka vitroindustrio.
29. VIII. Otakar Gadula: Specimenaj foiroj de Praha.
25. IX. Otakar Gadula: Altaj Tatroj.
2. X. Karel Kapek: Bedřich Smetana kaj lia verko.
10. XII. V. Martínek: Ĉapitro el romano „La tero sonas". (Trad. kaj legis O. Gadula.)

9 disaŭdigoj dum 1934.

1935:

15. I. Inĝ. F. Fährich: Homoj kaj maŝinoj. (Trad. kaj legis O. Gadula.)
30. I. Inĝ. L. Krajc: Kiel servas esp-o al nia respubliko (pro malsaniĝo de la aŭtoro legis O. G.).
13. II. Karel Kapek: Vintraj sportoj en ĈSR.
20. II. O. Gadula: Ĉeĥoslovakujo, la lando de avantaĝa aĉeto.
5. III. O. Gadula: La korpedukado en ĈSR.
13. III. O. Gadula: Ĉeĥoslovaka aŭtomobilindustrio kaj aŭtomobilismo.
27. III. Vladimír Slaný: Ĉeĥoslovaka agrikulturo.
1. IV. O. Gadula: De okcidento orienten.
9. IV. Ing. L. Krajc: Niaj rilatoj kun eksterlando.
16. IV. K. Kapek: Antonín Dvořák kiel homo.

*

1. V. 22·15—23·00 h. Brno-Praha-Mor. Ostrava sendis la opereton „Sur rozoj sternite" en esp-a traduko (jam duan fojon).

---

# Ricevitaj libroj kaj gazetoj.

Librojn, ĉe kiuj estas notita prezo en Kč, liveros la Libroservo de ĈAE afrankite por la notita sumo.

*Julie Šupichová*: *Esperantský dopisovatel* (Esperanto-Korespondanto.) Návod, jak psáti esperantské dopisy soukromé a obchodní. Instrukcio kiel skribi privatajn kaj komercajn leterojn en esperanto. Nakladatel Josef Svoboda, Praha-Pankrác, Ul. 1. listopadu, 796. Paĝoj 144, 18·5x13·5 cm. Prezo 12·80 Kč (afrankite). — La nova verko de la senlaca labor-

istino trovos certe multajn uzantojn precipe inter esperantistoj, kiuj volas perfektiĝi en uzo de korespondа lingvo. Ĝi enhavas paralelajn ĉeĥe-esperantajn listojn de parolturnoj uzataj en leteroj p r i v a t a j (paĝoj 4—26) kaj k o m e r c a j (p. 27—53). Poste sekvas listo el korespondado inter esperantistoj, listoj de landnomoj kaj mallongigoj, diversaj modeloj de korespondaĵoj kaj ĉe la fino (p. 115 ĝis 141) ĉeĥa-esperanta vortareto enhavanta plurajn fakajn terminojn. La aŭtorino ricevu nian gratulon. La libro estas mendebla pere de nia Libro-Servo.

*Julie Šupichová*: *Esperanto, jeho vývoj a význam pro národní školu.* (Esperanto, ĝia evoluo kaj signifo por nacia lernejo.) Praha 1935. Nákladem Československé grafické unie a. s. 50 paĝoj 18x15 cm. Prezo Kč 5·20 afrankite. Tiu ĉi nova verko de s-ino Šupichová enhavas koncizan historion de esperanto-movado, vivon de Zamenhof, informon pri teorio de esperanto, pri organizo de la movado, disvastiĝo de esp-o, ĝiaj plej gravaj sukcesoj, pri esperantlingva literaturo, pri esp-o inter instruistaro, kaj en lernejo kaj la finan ĉapitron „Kiel instrui esp-on?" La bele presita broŝuro estos tre serĉata helpilo por ĉiu, kiu volas esti pli detale informita pri la movado, precipe por la kandidatoj de ekzamenoj. La fervora aŭtorino akceptu nian dankon kaj la interesantoj mendu la libron. Nia Libro-Servo peras la mendojn.

*Dro. Jan Hořejší*: *Jak studovat.* Praha 1935, 240 pĝ. 14x20 cm. 65 ilustraĵoj, 57 tabuloj kaj riĉa registro. Prezo 38 Kč afr., prizorgas ankaŭ Libro-Servo de ĈAE. En ĉeĥa lingvo. — Riĉa konsilaro por ĉiu studento, memlernanto kaj ĉiu inteligentulo ĝenerale. Valora helpilo al la junularo por ekiro en la praktikan vivon. Rekomendas ankaŭ esperanton. La bona verko de sperta pedagogo aperas jam en dua eldono.

*La juna vivo.* Dusemajna organo por la junularo. Destinita por 12—16 jaraj gejunuloj. Red. kaj adm. West-Graftdijk (N. H.), Nederlando. Jara abono Kč 16·50. Bonega revueto kun simpla, sed valora teksto. Meritas grandan disvastiĝon.

**Ĉeĥoslovaka eldonisto propagandas esperanton.** En T ř e b e c h o v i c e p o d O r e b e m aperas de la nuna jaro monata bulteno „Měsíční zpravodaj", kies eldonanto estas s-o **Ant. Dědourek.** La bulteno eliras en kvanto de 35.000 kaj estas senpage sendata al ĉiuj lernejaj inspektoroj, pedagogiaj institucioj kaj direktoroj de naciaj lernejoj. Sed la plej ĝojiga fakto estas, ke la nomita eldonisto m e m proponis al samideanino J. Šupichová verki r e g u l a n esperanto-kronikon por la Bulteno ko j promesis senpagan publikigon de adresoj de eksterlandaj instruistoj (lernantoj izolaj kaj klasoj). Estas en nia historio la unuan fojon, ke la eldonisto volas helpi al ni en la propagando. *Samideanoj nialandaj kaj tutmondaj*, sendu dankon al li kaj postulu — se vi interesiĝas pri la afero — senpagan publikigon de via adreso. (La aliaj gazetoj estas petataj pri afabla represo de tiu ĉi sciigo. Antaŭan dankon!) JŠ

---

Sub la redakto de Stanislav Kamaryt kaj Otto Ginz aperos en plej proksimaj tagoj

## Ĉeĥoslovaka Antologio.

Fundamenta verko, kiu ne povas manki en biblioteko de ĉeĥoslovaka esperantisto. Majstraj tradukoj el proksimume 80 prozistoj kaj poetoj. Multaj ilustraĵoj.

Interesiĝantoj anoncu vin jam nun ĉe **Libro-Servo de ĈAE** kaj vi ricevos tuj post apero ĉiujn detalojn.

---

**Modela esperantisto.** S-ro Bohuslav Novotný, laboristo, Hlušovice 48 apud Olomouc, poŝto Bohuňovice, dum kelkaj jaroj senlabora kaj senespera, ricevis antaŭ unu monato laboron ĉe vojriparoj. Li laboras 40 horojn semajne kaj ricevas Kč 2·50 pohore. Li skribas al nia amiko Neužil en Olomouc: Nun venis la momento por aliĝi al esp. organizaĵoj. Kial atendi? Ĝis kiam mi denove ĉesos labori? — Li aliĝas al ĈAE, UEA, al la Esp. Soc. Olomouc kaj sendas samtempe la kotizojn. Li lernas diligente germanan, francan kaj anglajn lingvojn.

### Ĉu vi pagis vian kotizon?

Se vi tion ne faris, bonvolu sendi nun sen la prokrasto la negrandan sumon de **Kč 16·—** al la poŝtĉeka konto nro 9602 de Svaz československých esperantistů, Praha.

La Asocio plenumas honeste siajn devojn, plenumu ankaŭ la vian.

Ni akceptas ankaŭ le kotizojn por UEA kaj ni ripetas, ke pagas en 1935:

| | | |
|---|---|---|
| MJ | Membro kun Jarlibro . . . . . . . | Kč 25·— |
| MA | „ „ „ kaj gaz. Esperanto | „ 60·— |
| MS | „ „ „ kaj gaz. Esperanto kaj kun valoraj libraj premioj | „ 160·— |

La Delegitoj jam depost 1934 ne deprenas ion de la enkasigitaj kotizoj. Se iu tion faris, li bonvolu nun sendi la reston. Membro-Abonantoj (MA), kiuj pagis sole 50 Kč, sendu nun la mankantajn 10 Kč, ĉar nunjara kotizo estas 60 Kč.

Anstataŭ nova Jarlibro aperos sole kompletigo por 1935. Ĝin ricevos ĉiu repaginto, membroj novaj ricevos samtempe la Jarlibron 1934.

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz čsl. esperantistů v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík. — Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. — Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933. — Podací úřad Praha 45.